三木会ではコロナウイルスのために例会が持てないので、リレートークを行いました。
*Sanmokukai faris relajsan rakontadon, ĉar ni ne povis okazigi regulan kunsidon pro la epidemio, kronviruso.*

## Vesperruĝa Ĉielo

Verkis; sanmokukai-anoj;
Abe-A, Aoyama-T, Hirukawa-S,
Kamakura-S, Ooi-H, Sanpei-K, Ueno-Y

En iu tago Jun kaj Aya iris promeni por refreŝiĝi de kronviruso. Dum longa tempo ili promenadis, kaj ili venis al nekonata loko. Tie ili vidis strangaĵon, kiu havas du ruĝajn altegajn fostojn kun teruraj vizaĝoj. Ĝi estas kvazaŭ la pordego por eniri en teruran landon.




“Kio estas ĉi tio?”, diris Aya.

“Mi ne scias, sed ni eniru!”, Jun diris, kaj ili eniris en la pordegon kun granda teruro.

Nu, Jun kaj Aya estas scivolemaj. Ili fariĝis tuj forgesemaj pri danĝero de kronviruso . PIi kaj pli iIi antaŭeniris, sed nenion ili trovis. Tamen Jun sentas ne ordinaran atmosferon, kaj li rimarkis ian varmon. Ĉu ĉi tio estus varmofonto ?

S-ro Jun kaj s-ino Aya kune paŝis sur stranga vojo kun grandega maltrankvilo.



Paŝante sur vojo, ili vidis grandan devizon sur terura pordego. Ĝi montris la vorton, ”Laboro liberigos.” Ili sopiras pri sia iama granda potenco. Nun Jun estas persekutata de homoj pro sia diskriminacio kontraŭ virinoj.

Tamen Aya malatentas pri tio, kaj ŝi estimas kaj amas Jun.

Kien atingos ili? Kaj kia okazaĵo atendos ilin?

Ili plu marŝis kun iom da maltrankvilo en la duonlumon de la vojo. Subite placo kun diversaj floroj kaj plantoj aperis antaŭ la du. Ĝi estis elizeo por Jun kaj Aya. Ili tute surpriziĝis de la pitoreska pejzaĝo, kaj ili tuj liberiĝis de siaj zorgoj.

Sur revenvojo la du estis surprizitaj de abrupta pluvo. Kompreneble ili tratrempiĝis.

Ja, ili eniris en la mondon de infero kaj elizeo tra la pordego. Ili jam deziris reveni al la ordinara mondo, sed kie troviĝas la pordego?

Feliĉe aŭ malfeliĉe ili povis vidi inferon kaj elizeon. Jam ili kontentiĝis per la aventuro.

Sed nun pluvas severe, ili trempiĝis, kaj ilia vigleco perdiĝis.

Post kelkdek minutoj, Aya serĉas sian edzon, kaj fine trovis Jun tremantan en la angulo de dormoĉambro.

Aya: (laŭte) ”Kio okazis! Jun!”

Jun: ” Mi, mi nenion komprenas, mi nur malvarmiĝis en la pluvego.”

Aya: ”Jun! trankviliĝu, ĉi tie estas via ĉambro.”

Jun: ” Mi nenion, nenion, nur estas en malvarmo.”

Aya: ”Trankvile vi sciigu al mi vian sperton.”

Jun: ”Jes, ankaŭ vi ĉiam estis kun mi, do vi same spertis, ĉu ne?”

Aya: ”Ne, bedaŭrinde mi ne estis kun vi.”

Jun: ”Ĉu vi memoras tiun grandan pordon?”

Aya: ”Ne, mi ne scias tian grandan pordon, kiun vi diras. Tamen, oni diras, ke en la centro de ĉi tiu kvartalo estas la plano konstrui maljunulejon.”

Fakte, antaŭ la informejo staras vane alta pordego.

Mi vidis, ke multaj maljunuloj eniris tra tiu pordego.

En la afiŝo estis la desegno de bela ĝardeno kun multaj floroj, kaj ankaŭ estis varmofonto.

Jun: ” Jes, jes, ankaŭ ni kune eniris en tiun pordegon.”

Aya: ” Ne, nur vi eniris, ĉu ne?”

Jun: ”Ĉu mi sola eniris? Mi ne povas kompreni.”

Jun: ”Kaj mi rememoras, ke mi diskriminaciis virinojn en la laborejo, kio subite aperis en mia cerbo.  Nun mi repripensas mian agon, pri kio mi ege hontas.”

Aya: ”Tamen, nun vi estas en Esperantujo, en kiu neniu trovas tiajn homojn.”

Jun: ”Mi tre ĝojas, ke vi ĉiam sidas eĉ en mia sonĝo. Jes, mi, kien ajn eĉ al infero aŭ elizeo sekvos vin.”

Ili malrapide eksidis sur la sofon en la familia ĉambro.  La vesperruĝo verŝis mildan lumon sur iliajn dorsojn.

Aya: ” Kara, vi ŝanĝu la vestaĵojn rapide!  Kaj ni manĝu supon! “

(fino)